

Informoj de la FIPCO-laborgrupo Esperanto
Numero 2 Januaro 1963

Al ĉiuj niaj gelegantoj ni deziras feliĉon kaj sanecon dum 1963 o:o

PRAGA 1962

En la "tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj" en Prago 1962 oni montris du kolektaĵojn pri la temo Esperanto.La sukcesaj kolektantoj estas:
Dolfa Bartosik, Prago, Ĉeĥoslovakujo
Salvino da Fonseca, Sao Paulo, Brazilo
Okaze de tiu ekspozicio aperis speciala poŝtkarto kun surpreso en Esperanto kaj tri pliaj lingvoj.Krome la karto montras la ekspozician emblemon kaj Esperanto-stelon.

Esperantistoj sur poŝtmarkoj

Preskaŭ ĉiuj gesamideanoj, kiuj ĝis nun skribis al nia laborgrupo, mire demandis, ĉu ekzistas poŝtmarkoj kun la portretoj de aliaj Esperantistoj aŭ amikoj de Esperanto, krom d-ro Zamenhof. Nu, eble ne estas multaj.Ĝis nun ni konas la jenajn:
Leo Tolstoi (diversaj de Sovetunio)
Torres Quevedo (Hispanujo 1955)
Klara Barton (Usono 1948)
Ĉiuj gesamideanoj en la tuta mondo estas petataj,pripensi kaj serĉumi, ĉu aliaj poŝtmarkoj de tiu speco ekzistas.Anticipe ni dankas!

Ni uzas la jenajn mallongigojn:

pm = poŝtmarko pmj = poŝtmarkoj E-pm = Esperanto-poŝtmarko
UTK = unuataga koverto o = uzita, kun stampo x = neuzita
xx = neuzita kaj sen fiksilo, do en la stato, kiel ĉe la poŝto ricev.

o:o SUB LA LUPEO o:o

Pola samideano raportas:
Okaze de la 75jara jubileo de nia lingvo en Polando aperis du poŝtkartoj kun enpresitaj markoj (do tutaĵoj!).Temas pri du diversaj pm, kiuj ekzistas nur sur tiuj kartoj,sed ne estas unuope haveblaj. La pm montras tekstojn kaj emblemojn rilate la E-jubileon.Aperis de ĉiu speco 25.000 ekzempleroj.Po 17.000 de ili aĉetis la Pola Esperanto-Asocio.Tie la Esperantistoj povas mendi la kartojn.

El Karl-Marx-Stadt,Germanujo orienta,ni ricevas la jenan informon:
De la nova E-pm kun ruĝa surpreso de Bulgarujo al la kongreso en Burgas estis senditaj 2700 ekzempleroj.Unua tago de vendo estis, nur en la kongresejo,la 13-VII-1962.Ĝis la 31a de julio tiu pm ne aperis en aliaj poŝtoficejoj.La poŝto uzis du apudstampojn en verda koloro. Ekzistas dek kovertoj kun violkolora apudstampo.La apudstampon montras la kongresinsignon kaj estis pentrita de la Esperantisto M.Janev.
Aldona rimarko de Oberkirch:
Evidente la unua vendotago estis la 13-VII-1962.Tamen mi ricevis el Sofio UTK kun la E-pm kaj stampo de Sofio kun la dato 17-VII-1962.

Raporto el Barcelona,Hispanujo:
En Brazilo kun aprobo de la generala direktoro de la poŝto oni eldonis kajerojn enhavantan la serion pri la milita venko de 1945. La Esperantistoj interesiĝas pri du kajeroj.Unu enhavas folion esperantlingvan kun klariga teksto pri la bildoj.La alia enhavas sep klarigajn foliojn,ĉiu kun alia lingvo, inter ili Esperanto.

En Aŭstrujo oni uzis specialan "aerogramon" kun la germanlingva teksto SONDER-FLUGPOST WIEN-PHILADELPHIA FÜR AMERIKANISCH-OSTERREICHISCHE FREUNDSCHAFT. Tiu "aerogramo" estas tutaĵo,do ĝi havas surpresitajn poŝtmarkojn.Unu el ili estas la E-pm de Aŭstrujo 1949.Laŭdire ekzistas plura tutaĵo kun ĉi tiu E-pm,nome poŝtkarto. Kiu posedas ĝin?

En Brazilo oni uzas afrankan stampon por gazetoj forsendataj per poŝto. Ĉiun ekzempleron oni signas per triangula stampo,kiu enhavas inter alie la titolon de la gazeto.Laŭ nia scio ekzistas stampoj por la RIO ESPERANTISTA kaj por la ESPERANTA KOOPERATIVO.

F I P C O   S C I I G A S:

Oficiala informilo germanlingva estas la gazeto INTERNATIONALE FILATELIE.Ĝi speciale servas al la kolektantoj laŭ-motivaj kaj laŭ-temaj. Pro abono skribu al: Filatelie-Verlag,Postfach 283,Bad Ems,Germanujo.

o:o P R I   N I A   L A B O R O o:o

Dum la 40a Germana Esperanto-Kongreso,pentekoston 1962 en Oberkirch, kunsidis kelkaj filatelistoj.La temo estis la ĵus fondita FIPCO-laborgrupo Esperanto.De la ok kunvenintaj samideanoj intertempe kvar fariĝis membroj de la laborgrupo.En dumkongresa ekspozicio estis montrataj E-pmj kaj multaj E-stampoj.Tre alloga estis kolektaĵo pri E-leteroj el 85 landoj de nia membro O.Böhm, Karlsruhe.

Pola samideano proponas,fondi naciajn laborgrupojn pri nia temo.Fakte estas konsilinde,ke la membroj en ĉiu lando forte interkontaktu.Bedaŭrinde ĝis nun Germanujo okcidenta estas la sola lando,kie ni havas pli ol unu membron. Do - ĝis pli poste!

Ni preparas precizan katalogon pri la E-pmj kaj liston kun la numeroj el la plej gravaj katalogoj en la mondo.Detala informo sekvos baldaŭ.

Post la dissendo de la "verda lupeo" n-ro 1 al Oberkirch venis leteroj de interesuloj el 14 landoj.Kontentiga komenco!

Ni dankas por donacoj: E-pmjn kaj E-stampojn donace sendis al la laborgrupo la samideanoj d-ro Berlot,Francujo; G.P.Evaristo,Hispanujo; Frantisek Tichy,Ĉeĥoslovakujo; Henry Thomander,Svedujo.
S-ano W.Franke,Usono,donacis unu dolaron. - Koran dankon al ĉiuj!

o:o N I A   F O I R E T O o:o

Interŝanĝe mi ofertas la novan bulgaran E-pm de 1962 kun ruĝa surpreso xx kaj o, sur letero kaj sur poŝtkarto kun E-stampo.Krome mi fordonas la polajn E-pmjn xx.Serĉas mi de Brazilo E-pmjn,UTK kaj E-stampojn, krome de Hungarujo ĉiujn sendentajn E-pmjn. - Mi deziras kontakton kun kolektantoj en Francujo,Germanujo okc. kaj Svislando,kiuj deziras ricevi pmjn de Germanujo orienta. - Skribu al Rudolf Burmeister, W.Wolff-Str.1, Karl-Marx-Stadt W 33, Germanujo orienta.

Komercisto ofertas glumarkojn esperantlingvajn pri la olimpiaj rajdludoj 1956 en Stockholm.Disponeblaj estas kvar diversaj tipoj, ĉiu en kvar koloroj, do entute 16 glumarkoj je prezo de DM 13.20 plus afranko. Interesuloj kontaktu kun Oberkirch.

La FIPCO-laborgrupo "jarcenton poŝtmarkoj" serĉas: Specialan poŝtkarton kaj specialan koverton okaze de la filatela ekspozicio dum julio 1940 en Belo Horizonte (Minas Gerais),Brazilo.Oni uzis nacilingvan specialan poŝtstampon kaj krome apudan stampon verdkoloran en Esperanto.
Intersanĝe oni ofertas specialajn poŝtkartojn kun esperantlingva apudstampo de Minas Gerais 1939 kaj de Rio 1938(BRAPEX 1).
Interesuloj kontaktu kun Oberkirch.

Hungara samideano serĉas kontakton kun germana filatelisto.Li kolektas germanajn pm xx.Interŝanĝe li ofertas hungarajn seriojn.Bazo estu la katalogo "Michel".Skribu al Otto Sülle,Hasnal-U33,Budapest XX,Hungario.

Mi ofertas filatelaĵojn de Hungarujo (pri E kaj aliajn).Rekompence mi akceptas respondkuponojn aŭ filatelaĵojn pri la temoj muziko,pentroarto,faŭno raketoj.Pro detaloj skribu al d-ro J.Darday,Eötvös-u.9.f.4. Budapest VI, Hungarujo.

Poŝtmark-albumo por Esperanto-kolektaĵoj aperis! La folioj ne estas ilustritaj, sed surhavas verdan E-stelon. Interesuloj skribu al Koffler-Druck, Schwanenstr.30, Dortmund, Germanujo okcidenta.

La laborgrupo scias kelkajn adresojn de filatelaj komercistoj en Germanujo kaj en Triest, kiuj ofertas E-pmjn. Informojn donas Oberkirch.

Anoncojn por "nia foireto" ni akceptas kontraŭ pago de 20 Germ.pf. po linio aŭ de unu respondkupono po du linioj.

LA VERDA LUPEO ESTAS LA INFORMILO DE LA FIPCO-LABORGRUPO ESPERANTO
Adreso: Hermann Heiss, Höllmattstr.34, 7602 Oberkirch (Baden), Germ.okc.

Kolektantoj atentu !!

FIPCO estas la tutmonda organizaĵo de la filatelistoj, kiuj kolektas laŭ la motivoj kaj laŭ la temoj. Interesuloj devas fariĝi membroj en la koncerna landa sekcio. Poste ili rajtas kunagi en ĉiuj laborgrupoj. En la kadro de FIPCO ekzistas dekoj da laborgrupoj pri la plej diversaj temoj, ekzemple religioj, muziko, junularorganizoj, Esperanto.

Jen listo pri la landaj sekcioj de FIPCO:

Aŭstrujo: Anton Drahovzal, Fasangartengasse 58, Wien 13
Belgujo: J. Jespers, 77 Gasthusstraat, Turnhout
Danlando: Dansk Motivsammler Forbund, W. Klaebel, Korsagervej 2, Aabyhøj
Finnlando (Suomio): Suomen Aihefilatelistit r.y., Lokero 4013, Helsinki
Francujo: Jean Moissette, 37 Chemin des Lyonnes, Villiers-sur-Marne (Seine-et-Oise)
Germanujo: Motiv-Sammler-Gilde
Dipl.Kfm. Ernst Herd, 8 München 9, Postfach 15
Grekujo: G.Papastefanou, Museum-Manager, Olympia
Hungarujo: Magyar Belyeggyüjtök Orszagos Szövetsege
Nepköztarsasag u. 3, Budapest VI
Israelo: Simon Adomi, POB 382, Ramat Gan
Italujo: Associazione Filatelisti Tematici Italiani
Conte Vincenzo Fardella-Quernfort, Via G.Sciuti 84, Palermo
Jugoslavio: Dr.V.Simic-Vakanovic, Jurjevska 27 B, Zagreb
Luksemburgo: Philcolux, Georges Heischling,
69, Zue Pierre Krier, Luxembourg-Bonnevoie
Nederlando: "De Beeldfilatelist", K.Schulz, Kleverparkweg 143, Haarlem
Norvegujo: Norfipco, Odd Grahm, Nordterassen 7, Jar
Pollando: Polski Zwiazek Filatelistow, ul.Widok 22, Warszawa 10
Sud-Afriko: Thematic Stamp Club, Capt.M.F.Stern, P.O.Box 3654, Cape Town
Svedujo: Svenska Motiv Samlare, Nils Avelius, Artillerigatan 74 //Stockholm NO
Svislando: Schweiz.Motivsammler-Vereinigung
Alfred Speck, Freihofstrasse 2, Zürich 48

Por ĉiuj aliaj landoj koncernas la "ĝenerala sekcio de FIPCO", adreso: Heinrich Walz, Postfach 615, Saarbrücken 2, Germanujo okc.

Ĉiuj Esperanto-filatelistoj, kiuj estas membroj en la koncerna landa sekcio de FIPCO, nepre poste fariĝu membroj en la FIPCO-laborgrupo Esperanto ! La laborgrupo nuntempe ne postulas propran kotizon !

- -

A L I Ĝ I L O

Mi deziras esti membro de la FIPCO-laborgrupo Esperanto kaj pretas, aktive kunhelpi en la agadoj de la laborgrupo.
Mi estas membro de la koncerna landa sekcio de FIPCO.

Nomo:

Preciza adreso:

Lando:

Dato: